

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO



N° 202 OKTOBRO 1999

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta PIO X-a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



Sommaire/Enhavo

	Pages/Paĝoj
Le mot du président - <i>La bileto de la prezidanto</i>	3
Prière - <i>Preĝo</i>	5
Edith STEIN	6
Pinokjo kaj Dio Patro	9
<i>En nia Asocio</i>	12
Pastroj sur sportejo	12
Medalo de Toleremo	14
Kalendaro	16
Annonces - <i>Anoncoj</i>	16
Abonnements - <i>Kotiztabelo</i>	19

ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
Sendinto 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

Motif de non distribution

- Adresse insuffisante
- N'habite pas à l'adresse
- Refusé
- Autres

Périodique Semi-routé

PORT PAYE

COLMAR (68)

La Papa Beno.

Dum sia vizito al Pollando, la 10-an de junio la papo Johano Paŭlo la 2-a ricevis Medalon de Toleremo.

(Unua distingito- Vidu pli detalajn informojn en tiu-ĉi bulteno).

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto. Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 10.a de decembro 99. Venonta bulteno aperos fine de decembro..

Finpresado la 23/10/1999

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Nro 202 Oktobro 1999

Trimonata eldonajo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Espéranto A.C.F.E.)

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:

S-ro A. BESSIERE
28, Rue C. St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:

F-ino A.M. CHANEY
56, Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :

S-ro G. VILLENEUVE
14, Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :

P-ro L. BOURDON
7, Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:

S-ro M. COLLEU
95, Rue Victor Hugo
80440 BOVES

Redakcio :

Fam. BASSO-RESCIO
9, Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM

Fakse 0389794333

Rete 100623.3022@Compuserve.com

Le Mot du Président

L'année 1999 revêt une grande importance pour les espérantistes du monde entier. En effet il y a 150 ans, en 1859 naissait à Bialystok Louis Lazare Zamenhof qui devait en 1887 inventer la langue internationale que nous pratiquons.

Qui aurait cru à l'époque que le petit enfant qui voyait le jour serait un bienfaiteur de l'Humanité entière, un bienfaiteur hélas incompris, car les hommes n'ont pas réalisé l'importance et l'intérêt d'une langue internationale et refusent toujours de l'adopter sans même prendre la peine d'étudier sérieusement le problème.

En attendant, l'ONU et l'Union Européenne dépensent des sommes considérables pour traduire dans un nombre élevé de langues des textes, alors que l'adoption de l'esperanto résoudrait le problème et économiserait des millions d'euro.

Pourtant depuis plus de 100 ans, les espérantistes continuent à pratiquer l'esperanto, convaincus qu'ils sont de la justesse de leur idée.

Notons que Zamenhof, quoique israelite, a toujours manifesté une grande sympathie envers le catholicisme. Au premier congrès universel de Boulogne sur Mer en 1905 il a assisté à la messe célébrée par l'abbé Emile Peltier; notre fondateur, et par la suite il a fait de même lors de tous les autres congrès.

Cher Louis-Lazare, en cette année les espérantistes ne vous oublient pas; ils sont fiers de suivre votre exemple et restent convaincus, comme vous, que l'esperanto peut seul apporter une solution adéquate à la diversité des langues.

La Bileto de la Prezidanto

La jaro 1999 havas grandan gravecon por la esperantistoj de la tuta mondo. Antaŭ 150 jaroj, ja en 1859, naskiĝis en Byalistok Ludoviko-Lazaro Zamenhof, kiu en 1887 inventis la internacian lingvon, kiun ni praktikas.

Kiu kredus, tiuepoke, ke la eta infano, kiu ĵus naskiĝis estus bonfarante de la tuta Homaro, bonfaranto bedaŭrinde nekomprenebla, ĉar la homoj ne agnoskis la gravecon kaj intereson de internacia lingvo; ili ĉiam rifuzas adopti ĝin sen eĉ klopodi serioze studi la problemon.

Intertempe UNO kaj Eŭropa Unuiĝo elspezas konsiderendajn sumojn por traduki en multegaj lingvoj tekstojn, dum la adopto de esperanto solvus la problemon kaj ŝparus milionojn da eŭroj.

Tamen depost pli ol 100 jaroj la esperantistoj daŭre praktikas esperanton, konvikitaj pri la praveco de sia ideo.

Ni rimarku, ke Zamenhof, kvankam izraelido, ĉiam montris grandan simpation al katolikismo. En la unua Universala Kongreso en Bulonjo apud maro en 1905, li ĉeestis la meson celebritan de Pastro Emile Peltier, nia fondinto; poste li same agis okaze de ĉiuj aliaj kongresoj.

Kara Ludoviko-Lazaro, en tiu jaro la esperantistoj ne forgesas vin; ili estas fieraj sekvi vian ekzemplon kaj restas konvikitaj, kiel vi, ke esperanto sola povas alporti konvenan solvon al la diverseco de la lingvoj.

LA BONA EPOKO

Kion la homa specio povas travivi, kiel novan, kiun niaj prapatroj ne jam konis ?

Tamen oni renkontas homojn, kiuj riproĉe plendas pri sia nuna epoko kaj opinias, ke tiu de iliaj gepatroj estis pli bona epoko.

Se oni povus revenigi ilin en la epokon de iliaj gepatroj, ĉu ili ne riproĉe plendus same ?

La pasinteco, pri kiu vi opinias, ke ĝi estis la plej bona epoko, estas nur bona, ĉar ĝi ne estas la via.

S-ta Aŭgusteno.

Al Vatikano,

En la koro sonas kanto,
estas ĝi en esperanto,
temas ĝi pri lando kara,
kiu estas tre malgranda.

Tie loĝas Papo nia,
kiu estas Patro nia.
Estas li ja favoranto
de la lingvo Esperanto.

Vere pia amikaro
estas ni - katolikaro,
filoj de la prakristanoj
estas ni de Dio manoj.

En la koro sonas kanto,
estas ĝi en esperanto,
pri la lando Vatikano
sonas nur la voĉ' de amo.

WADOWICE



Bildo de
Dipatrino de La
Konstanta Helpado
Kronita La
16-an de junio '93
Fare de La Papo
en Wadowice.

Floru, kara eta lando
kaj prosperu Esperanto.
Benu ĉiam la preĝantojn,
esperigu esperantojn !

Edith STEIN (1891-1942)

Edith Stein naskiĝis en Breslau (Wroclaw), Pollando, la 12an de oktobro 1891 (Yon Kippour) -dekunua infano en juda familio.

Post du jaroj ŝia patro mortis kaj ŝi vidis sian patrinon labori senĉese kiel ligno-komercistino, Augusta Stein edukis siajn geinfanojn rigore kaj postuleme, laŭ juda tradicio.

Edith estis sesjara kiam ŝi ekiris al la lernejo kaj baldaŭ, pro sia amo por la sciencoj, ŝi estis kromnomita "sep sigelita libro".

Laŭ sia diro, ŝi ĉesis preĝi estinte dekkvarjara: "Mia nura preĝo estis mia soifo de vero", ŝi memoras "Kiu serĉas la veron scie aŭ nescie serĉas Dion."

Studante filozofion en Göttingen kaj Friburgo, ŝi malkovris la fenomenologion de Edmund Husserl kaj fariĝis helpantino de tiu juda filozofo.

Ŝi ankaŭ ekkonis Max Scheler kaj Heidegger.

En Julio 1916, vizitante la katedralon en Frankfurto, Edith impresiĝis de "Virino kun provizkorbo" surgenuita antaŭ la Sankta Sakramento por konfidenca dialogo. Nek en protestanta templo, nek en sinagogo oni preĝas ekster diservoj. Tiam okazis ŝia unua renkontiĝo kun la Kruco.

Per la vidvina konduko Edith komprenis la potecon kiun oni ricevas el Kristo Viva en la afliktaĵoj: "Tiam paliĝis mia judeco kaj lumigis min Kristo.

Ŝi ne plu malesperis, ŝi estis konkerita de la Vero. Somere de 1921, ĉe protestanta amikino Hedwig Konrad Martius, Edith allogiĝis de Sankta Tereza de Avila. Dum unu nokto

Ŝi legis la verkojn de Tereza, ŝi malkovris pri la sperto de vera vivo en Dio kaj komprenis, ke "tio estas la vero".

Kiam ŝi estis baptita la 1an de Januaro 1922, ŝi ricevis la nomon de Tereza, kaj fiere apartenis de tiam al Kristo kaj al la elektita popolo. Dum tiu epoko, la ĵusa konvertitulino tradukis la verkojn de Sankta Thomas d'Aquin, kaj J.H Newman, samtempe instruante filozofion ĉe la Dominikistinoj en Spire en lernejo. Ŝi ankaŭ prelegis tra Germanio kaj Eŭropo, ĉefe pri eduko, virina rolo en la nuna socio.

En 1933, kiam Hitler ekregis la landon, li malpermesis al judoj instrui, tiam ŝi sendis leteron al la Papo Pio la XIIa, petante enciklikon pri antisemitismo.

Devigite forlasi instruecon, Edith Stein decidis eniri la Karmelon de Koln, dezirante partopreni la Krucon de Kristo. Kiel la reĝino Esther ŝi volis pledi por sia popolo. Enirinte la 14an de oktobro 1933, fratulino Tereza, Benedikta de la Kruco, per simpla

kredokonfeso, fariĝis "edzino de la ŝafido. Post la solena kredokonfeso en 1938, ŝi devis eliri el Köln por la Karmelo de Echt en Nederlando, kun sia fratino Rosa, ankaŭ konvertita al katolika religio. En 1939, ŝi oferis sian vivon kaj morton por sia popolo kaj decidis partigi la komunan sorton de la katolikaj judoj de Nederlando. La 2an de aŭgusto 1942, ŝi estis arestita kun sia fratino Rosa kaj ili estis kondukitaj ĝis la Westerborka Kampo, poste al la Koncentrejo de Birkenaŭ-Auschwitz, kie ambaŭ mortis en gasĉambro la 9an de aŭgusto 1942.

La 11an de oktobro 1998, la Papo Johano Paŭlo la 2a kanonigis Edith Stein. Li invitis la homojn sekvi ŝian ekzemplon: rezigni trairi la pordon malfermitan al ĉiuj permesaĵoj, kaj aŭskultante la koran voĉon, elekti la mallarĝan pordon survoje al vera libereco. La ŝercado de la Vero kaj de la Amo estas nedisigeblaj: Edith Stein ne nur verkis pri la Kruco, ŝi vivis, kun la Sinjoro, la mistero de la Kruco, ĉefe en sia morto.

Laste, kontemplante sur la karmela morto, ŝi lernis "adori la Patron laŭ spirito kaj vero".

Ankaŭ ni estu, tiaj adorantoj.

Fratino Mari-Rose Pain

PINOKJO kaj DIO PATRO

Vere pli ekzakte estus paroli pri Pinokjo kaj Dio ĝenerale: sed Dio estas certe rolita de Gepeto, kiu agas tute patre. Do taŭgas ankaŭ la titolo antaŭdirita.

Kiel konate, Carlo Lorenzini, kvankam kutimis viziti dimanĉan tagmezan meson, ne envivigeblas sub religiaj flagoj, eĉ li projektis verki plezurigante la politikan klerulan kontraŭ eklezian tiam modan. Sed li devis mezuriĝi kaj konfrontiĝi, eble ne per konsciaj memdiskutoj, kun la adresitoj, kun la infanoj kaj certe kun sia nekonscio. Kaj rezultis verko alte kristana, la plej kristana de la tuta naŭdeka jarcento, laŭ Kardinalo J. Biffi

Mi certas ke ni ĉiuj konas la aventurojn de Pinokjo.

Kie ili troviĝas, en la verko, Dio Patro?

a) En Ĝepeto brile: kiu imagas la marioneton enŝlositan en la ligno kaj amegnin elfosas kaj ĝin alvokas pernome. Ĉu tiel ne faris ankaŭ nia kristana Dio Kreanta? Li antaŭe nin antaŭdestinis al la gloro de sia filo, poste nin kreis. Intertempe vi iru mense al la koncernaj skribaj paŝaĵoj.

b) Sed la kreaĵo de Ĝepeto, tiom amata, ĵus akirinte personan memstarecon,

anhelas al la kompleta memstareco kaj ekmokas tiun amon, eĉ forfuĝas tra kampoj kaj vilaĝoj. Kaj, reatinginte la filon, la afliktita patro sin sentas akuzita pri draŝadoj kaj miskomprenadoj flanke de la vilaĝanoj kiuj kompatas kaj liberigas la marioneton dum arestigas la patro-Ĝepeton. *Temas pri la sorto de nia Dio-patro fronte al la homo kiu ne kontentiĝas je tiu amo kaj serĉas alie kaj akuzas kaj akuzigas Dio-Patron pri tiraneco: emerĝas la psikologio de peko.*

Vi plu pensu pri bibliaj tekstoj priskribantaj tiun situacion.

c) Kaj jen Ĝepeto refaras la krurojn al la filo kaj vendas sian jakon por la abecedario, sed Pinokjo malŝparas ĉion kaj, trompите pro manko de patra defendo, iras ankaŭ perdi la kvin monerojn, tiel ke li falas en absolutan povon de malamikoj. Kiel trovi inter tiuj eventoj Dio-Patron? *Li troviĝas en la eklipso de Ĝepeto, en lia atendado de la reveno de la filo pekinta kiu nun estas disipanta la miregajn donojn ricevitajn de patra amo. Ĉu via penso ne iras al la perdiĝinta filo?*

d) Intervenias la Feino. Pinokjo kiu volus reveni al la patro-Ĝepeto, lin perdis el sia horizonto dum mem mankas je fortoj por rehejmeniĝi. Jen la helpo, la longa mano de Ĝepeto, la Feino, kiu reedukas,

kuraĝigas, korektas, eĉ severe, Pinokjon ĝis lin reenkonduki al la patro, por fine malaperi porĉiame.

Kiu ne vidas en tiu Feino la Eklezion, interparolanton de Dio kaj kunvojaĝanton al la Patro kun la pekuloj? Ankaŭ tiu ĉi fine malaperos kaj laboras nur por reenkonduki ĉe la Patron.

f) Kiom feliĉe finiĝas la historio! Pinokjo retrovas la patro-Ĝepeton, reamas, akiras la formon de vera infano, akiras la naturan korpecon kaj animecon de patro-Ĝepeto, provas kreskigi la ĝojojn de la patro kaj komencas la interŝanĝojn de konsentoj, de atendoj ... *Kiel ne memoris ĉi-tie ke nia Dio-Patro nin atendas por doni al ni ion sian, ion dina, farante ke ni partoprenu je lia naturo nin iganta liaj filoj?*

Kiel vidite, nenio enigma en Ĝepeto, nenio pretenda, nenio perforta: ĉio donace, ĉio ame: kiel Dio, kvazaŭ pardonpetante esti la kreinto de sia kreaĵo, ĉiam atendanta kunĝoji kun sia kreaĵo. La patreco de Dio eniris spontane el la kristanismo en genian verkon. Ĉu tio eblus el alia religio?

(Zecchin Armando - Katolika Sento 04.99)

EN NIA ASOCIO

Novaj membroj 1999:

- S-ro VELASQUEZ Jorge (Kolombio)
- S-ro RAGOGNA Mario (Italio)

Bonvenon al la genovuloj.

Donacis monon:

G-roj ANGEVIN, CORNUT, GIRAULT, LEVAL
Andrée kaj MELIGNON .

Bonfarantoj 1999 :

S-roj LEVAL Paul kaj SAMAIN.

Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

La Pastroj sur sportejo .

La 26-a de Majo okazis en Champagne sur Rhone (Ardèche) la kutima interrenkontiĝo de la seminaroj kaj klostroj de la regiono. Entute dek teamoj partoprenis (Champagne, St Jodart, Vienne, Paray, S.U Lyon, Toulon, ARS I, ARS II, Rimont, St Irene).

Post komuna diservo, kiu okazis je la 11a, ni tagmanĝis kaj senatende, organiziĝis tri subgrupoj; ĉiuj maĉoj daŭris dudek minutojn. Ni ekludis je la 14a sur la komuna sportejo. Preskaŭ dum tri horoj kaj duono , svarmo da homoj vestitaj per sutanoj kolorigis la nekutiman senvivan lokon. La grupanoj kantis kaj subportis

per akordionoj, tamburoj, laŭtparoliloj por kuraĝigi iliajn samteamulojn. Ankaŭ ĉeestis kelkaj monahinoj, vilaĝanoj kaj scivolemuloj. La etoso estis bona. Finfine St Jodart gajnis.

Je la 19a ni partoprenis la vesperan preĝon kaj sekve ni disiĝis post grava kaj memorinda vespermanĝo kaj popola ĝojo.

Fakte oni ĉiam opinias, ke la pastroj legas nur biblion kaj celebras mesojn. Multe estas la kristanoj kiuj ne scias kiel oni pastrigas . Ili nur vidas kaj renkontas pastrojn kiuj plejparte estas bonaj konsilantoj, bonaj instruistoj, por ĉio diri virtaj homoj kiuj montras la Di-vojon al la homaro, sed malbonaj sportuloj . Nu, en seminaroj kaj klostroj la sportaj agadoj okupas preskaŭ kvar horojn ĉiun semajnon. Oni praktikas diversajn sportludojn, piedpilkon, handbalon, retpilkon, korbopilkon, k.t.p. ĉar la sporto estas grava por la sano. Tamen en la nuna mondo la sporto, ne nur estas bonfarta rimedo, ĝi estas pli grava ĉar ĝi celas al la kunigo de la homoj kaj de la popoloj. La sporto estas kunligilo.

Vidu, la seminaristoj kaj monahoj de la ĉi-supra instruejo ne koniĝis unu la alia ĉar la instruejoj estas diversaj. Ankoraŭ pli grava kaj mirinda estas ke ili venis el ĉiuj kontinentoj. Dank'al la futbala renkontiĝo ili interparolis, diskutadis kaj kune manĝis (rompiĝo de la pano signo de frateco). Ni pensas ke tiaj okazoj estas favoraj ĉar ili helpas la porpastrajn studentojn ekbatali kontraŭ kelkaj miskomprenetoj kiuj kelkfoje ekzistas inter klostroj kaj diocezaĵoj pastroj, kiuj tamen devus esti UNU kiel la Patro kaj la Filo estas UNU.

Originale verkita de Gabriel ANDA
Abbaye St-Pierre.
07340 Champagne s/Rhone

Medalo de Toleremo:

Unua distingito Johano Paŭlo la 2-a

Enmanigis la medalon al la papo d-ro Louis C.Zaleski-Zamenhof, en akompano de prof.Hanna Konopka, prezidantino de Fondumo Zamenhof en Bjalistoko. La Medalo de Toleremo estis aljuĝita al la papo la 14-an de aprilo fare de kapitulo, kiun krom la reprezentantoj de la Fondumo konsistigas elstaraj personoj de la Bjalistoka socio, i.a ĉefepiskopo Stanislaw Szymecki.La ideo pri la medalo fruktis el multjara konversacio kun d-ro Zaleski-Zamenhof. La personaj vivspertoj de mia kunparolanto igis lin konsideri la toleremon fundamenta valoro de interhomaj rilatoj. Fondumo Zamenhof en Bjalistoko, same pro la patrono kiel pro la loko, ŝajnis kompetenta organo por lanĉi la Medalon de Toleremo.

Efektive dank'al impetaj klopodoj de prof. Konopka, kiu de du jaroj estras la Fondumon Zamenhof, la ideo trovis ĝeneralan apogon en Bjalistoko. La lokaj instancoj ne avaris monrimedojn por tiu nobla celo. La taskon doni artan formon al ĝi ricevis bulgara artisto vivanta en Bjalistoko, Dimitar Grozdev. Kapflanke de la medalo videblas planto inter du manoj kaj la vorto "toleremo" en Esperanto kaj pola. Dorsflanke troviĝas portreto de Zamenhof kaj bildo de Palaco Branicki, perlo de la baroko, nomata ofte "Versajlo de Podlahio" (la regiono kies ĉefa urbo estas Bjalistoko). D-ro Zaleski-Zamenhof difinas la toleremon kiel respekton al iu ajn alieco, i.a nacia,kultura,lingva,seksa,religia. Ĉion ĉi entenas ankaŭ esperantismo laŭ la koncepto de Ludoviko Zamenhof.

Kial la Papo ?

Laŭ d-ro Zaleski-Zamenhof, dum la pontifikado de Johano Paŭlo la 2-a la katolika eklezio iĝis pli tolerema ol iam,kion konfirmas liaj ekumenismaj streboj kaj nova rilato al aliaj religioj,same kiel lia forta kondamno de rasismo kaj antisemitismo.

Krome Johano Paŭlo la 2-a estas la sola ŝtatestro en la mondo kiu publike uzas Esperanton, dum la ĉiujaraj benoj je Kristnasko kaj Pasko. Li ankaŭ aprobis liturgiajn tekstojn en esperanto.La papo pretis akcepti la medalon dum la ekumena diservo en Drohiczyn la 10-an de junio. La solenaĵo estis televide elsendita por tuta Pollando.

D-ro Zaleski-Zamenhof raportis: " *Mi diris al Johano Paŭlo la 2-a ke mi estis kortuŝita kiam li kaj la altranguloj de diversaj eklezioj ripetis konkorde ke la homoj estas filoj de la sama Dio. Similaj vortoj kronas la poemon de mia avo 'Preĝo sub la verda standardo' . Ili sonas en Esperanto jene: 'Kristanoj,hebreoj kaj mahometanoj , ni ĉiuj de Di' estas filoj.'*

KALENDARO

- 19/01 PARIZO (Francio)
Komitata kunveno de nia
asocio
- 25/07 TEL-AVIVO (Israelo)
ĝis 85-a Universala Kongreso de Esperanto
- 01/08 [http://ourworld.compuserve.com/
homepages/profcon/m_uk85.html](http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/m_uk85.html)
- 05/08 Hongkongo (Ĉinio)
ĝis 56-a Internacia Junulara Kongreso
- 12/08
- Augusto Sebranice (Ĉeĥio)
19-a IKUE-Tendaro

ANONCOJ

- 01/ KALENDARO 2000 - niaj infanoj
Bela bildkalendaro , eldonita de la
Esperanto-klubo de Lund ,Svedio por apogi
la agadon de Pacamanta Esperanto Rondo
en Mwanza,Tanzanio kaj aparte por helpi
financi la diskonigon kaj disvastigon de
sunenergiaj kuiriloj tie kaj ankaŭ en aliaj
afrikaj landoj.

02/Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista

Estis fondita Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista (TOLE), kies sidejo estas en Bulgario. En ESPERO - organo de TOLE aperis alvoko al tutmonda ortodoksa esperantistaro kun jena teksto:

Estimataj kaj karaj gefratoj - ortodoksuloj
Longjare en niaj landoj regis ateismo kaj ni ne
havis eblecon publike esprimi niajn religiajn
sentojn. Nun dum la jaroj de demokrata evoluo
de niaj landoj ni havas eblecon, samkiel en aliaj
landoj, kie reĝas tradicie katolika, protestanta aŭ
aliaj religioj, ankaŭ tute libere esprimi niajn
sentojn.

En la tutmonda E-movado aktive agas kaj havas
aŭtoritaton diversaj fakaj E-religiaj asocioj.
Jam proksimiĝas la Jubilea 2000-a Jaro. Tiam
ankaŭ ni, la monda esperantistaro, reprezentantoj
de diversaj kristanaj religioj, devus unuigi niajn
fortojn por solena Festo de la Glora Jubileo.
Ni plej afable invitas vin kaj aliajn viajn
gekonatulojn -ortodoksulojn aliĝi al nia Ligo.
Viajn leterojn skribu al la jena adreso por
kontaktoj:

Bulgario, 4300 Karlovo , p.k 44, Esperinform
Inĝ. Boĝidar Leonov.

03/ LIBRO "PATRO NIA"

Por via informo aperis libro en esperanto
titolita "PATRO NIA " kun kompletaj studoj de la
preĝo al ni instruita de Jesuo.
Eldonita de Spiritisma Esperanto Asocio , do ne
katolika eldono.

04/Pilgrimo al Santiago de Compostelle en la jaro 2000

Mi instigas al Kampanjo: Esperantistoj survoje al Santiago de Compostela en la jaro 2000. Mi planas piede pilgrimi de la 15-a de julio 2000 de St-Jean-Pied-de-Port (Pireneoj-Francio) al Santiago de Compostela (Hispanio) (cirkaŭ 750 km).

Mi invitas, ke laŭeble multaj Esperantistoj estu samtempe survoje, por ke oni en la rifuĝejoj, la tranoktejoj de la pilgrimantoj, aŭdu nian lingvon. estus ege agrable, renkonti aliajn Esperantistojn kaj iri kun iuj parton de la vojo.

Sed mi ne celas, aliĝi al tuta grupo aŭ organizi tian, ĉar tio tre komplikigas la piediran pilgrimadon.

Se vi havas intereson, skribu al mi pro pliaj detaloj.

S-ano Rudolf-Josef FISCHER
Gustav-Adolf Strasse 2a
D-48356 NORDWALDE
Germanio.

RADIO VATICANA

RADIO VATICANA - Elsendoj en Esperanto.

La elsendoj okazas en tri diversaj tagoj de la semajno, sed en la sama horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo

(horo 19.20 UTC/GMT)

DIMANĈE - DAŬRO 9'20" - frekvencoj:

mezonde 527 kaj 1530 kHz

kurtonde 4.005 (74.90 m.), 5.880 (51.000 m.) kHz.

MERKREDE KAJ ĴAŬDE - daŭro: 9' - frekvencoj: kurtonde 7.250 (41.37 m.) kaj 9.645 (31.10 m.).

Petu la senpagan sesmonata program-bultenon.

Skribu al:

RADIO VATICANA - ESPERANTO REDAKCIO - SCV - 00120 CITTA' DEL VATICANO

L. C. Zaleski-Zamenhof montras
la Medalon de Toleremo.



Kompare de Roman Dobrynski

Kotiztabelo 1999

	Frankoj	Euroj
I.K.U.E kun "Espero Katolika"	164	25,00
Peranto : S-ro M. COLLEU 95, Rue Victor Hugo 80440 BOVES P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .		
A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto" unuopulo	60	9,15
geedza paro	80	12,20
gejunuloj ĝis 25-jara, pastro, religiu(in)o	30	4,57
bonfaranto	200	30,50
Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N		

Dépot légal : 3ème trimestre 1999

C.P.P.A.P : N° 62532

Imprimé par : A.C.F.E à 9, Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM

Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris

sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996

Directeur : Albert BESSIERE

Directeur délégué: Michel BASSO